- 1- "La Luzidoj", de Camoes, en traduko de Leopoldo H. Knoedt. Temas pri la eposo de la Portugaloj. Se vi ŝatas poeziaĵon, vi multe ĝuos legante tiun poemaron enhavantan pli ol 8800 versoj en ok-versaj strofoj laŭ la skemo a-b-a-b-a-b-c-c. Kiun plej gratuli kaj danki? La aŭtoron? La tradukinton? Legu kaj elektu mem.
- 2- "Tutmonda sonoro", de nia majstro en la poezi-arto, K. Kalocsay. Tiu Hungaro kapablis redoni en Esperanto poemojn tradukitajn el... 30 lingvoj! Kompreneble li helpis sin de aliaj tradukoj, ĉar regi 30 lingvojn ĝis kapablo al poezi-traduko, kiu povas? Tamen oni retrovas en tiuj poemoj, la lertecon, la purecon, la laborkapablon de Kalocsay. Vi marŝos de "Gilgameŝ" ĝis "Te Hanh". Francoj, vi povos sperti kiel Kalocsay redonis niajn francajn poetojn. Leginte el V. Hugo mi rajtas aserti, ke la traduko estas pli ol elstara: ĝi redonas ĉiujn nuancojn de la franca teksto kaj pli ol iom el ĝia muziko. Provu kaj diru mem.
- 3- "Boule de Suif", de Guy de Maupassant, tradukita de Fernando de Diego. Mi ĝojis ekscite, ke tiu novelo, kiun mi multe ŝatas en la franca, tradukiĝis en Esperanto. Bedaŭrinde mi devas konfesi, ke mi ne ŝatas la tradukon, kiu ne laŭiras la ĉiutagan lingvon. Tre simple skribis Maupassant. Tro malsimple tradukis de Diego. Tamen vi povas legi.
- 4- "Poemoj", de Cesare Pavese, tradukitaj de Minnaja: mallongas la poemoj sed profundas la temoj kaj glatas la lingvo. Se vi ŝatas la italan poeziaĵon, ne forgesu aĉeti kaj legi.
- 5- "Angoroj", de Karolo Piĉ, originala poemaro en Esperanto. Mi devas agnoski, ke mi ne tro ŝatas la neologismojn, tamen plaĉis al mi tiu poemaro pro la muziko, la ritmo kaj la enhavo.

Tiujn leg-notojn liveras al vi, ege subjektive, via libro-servanto Roger Degrelle.

AL ĈIUJ AKTIVULOJ!

Finiĝas la lernojaro kaj LA INFORMILO reaperos nur post la somerajferioj. Raporteto pri via agado estus bona en la venonta numero de nia revuo. Ĝi estos grava helpo por la sekretario (jara raporto) kaj instigo al agado por la novaj membroj. Do prefere verku tuj kaj sendu al la redaktoro, P. DENIS.

Kolegoj kaj instruemuloj, venu al la Metz-a staĝo, ni kune pridiskutu tiun aferon la dimnaĉan post-tagmezon.

AL ĈIUJ INSTRUISTOJ, PROFESOROJ KAJ INSTRUEMULOJ!

Ĉu ni atendu senage ĝis forgesemaj politikistoj konsentos enigi Esperanton en la lernejojn? Pluraj inter ni instruas en lernejoj, kolegioj, liceoj kaj universitatoj. jam nun ni povas nonci kursojn lerneajn en la departementoj 54-55-57-67-68. Ĉu helpas al ni volontuloj en 51, 52 kaj 88? Ĉu plimultigo de tiaj kursoj ne estus la pruvo, ke ni jam ekzistas?

E. Ludwig

NANCY

Nun ni estas 15 membroj en la Esperanto-Klubo de MJC Philippe Desforges. Funkcias tre bone, regule, unu vespera kurso ĉiusemajne por komencantoj (merkrede 20a30 krom dum ferioj. gvidas ĝin nun la subskribinto. La 2a kurso (je la 18a30) finfine ne povis okazi.

Funkcias ankaŭ 2 studrondoj, la unua dufoje monate (marde je la 18a30), gvidata de S-r^o Degrelle, kunigas 4 ĝis 6 partoprenantoj kiuj tralegas la libron "La nova butikestro de Nukugaia". La alia kunigas 3-4 personojn por studo de la verko "Fabloj de la verda pigo". Ni festis la Zamenhof-tagon la 18an de decembro. Malgraŭ terura neĝo, ŝtormo, kiu preskaŭ malhelpis trafikon en la regiono de Nancy, 12 personoj partoprenis tiun aranĝon dediĉitan al la kreinto de Esperanto.

Jam de kelkaj monatoj Yves Scheffer informadas pri Esperanto en la Medicina Fakultato, last-tempe per artikolo en la faka bulteno. Deko da studentoj interesiĝas kaj komencis lerni la lingvon.

Norvega samideano, KJELL PEDER HOFF, studas nun en la Eŭropa Universitata Centro en NANCY. Li prelegis la 30an de marto dum unu horo en la Universitato. Li kontaktis krome studentojn en la Beletra Fakultato. Tie studas nun Denis KURT (kiu lastjare ellernis Esperanton perkoresponde kaj aperigis informojn en la bulteno de ISIN, poringeniara instituto en Vandoeuvre). Ni esperas pri kurso venontjare en la Universitata Medio.

Mi aldonu, ke mi rifuzis ĉi-jare gvidi kurson en liceo, malgraŭ peto de la Direktorino. Mi opinias, ke mi perdis tro da tempo pri tiuj kursoj dum 3 jaroj (nur 1 lernantino en 3 jaroj studis serioze kaj finlernis). Mi konsentus gvidi kurson nur por instruistoj... Sed tio estas alia afero!

J.P. COLNOT

BRUYERES (88600)

S-r^o CLAUDEL prelegis dum januaro, pri Esperanto, antaŭ tuta klaso (2A) dum 1 horo, montrante gazetojn, librojn kaj klarigante la ĉefajn punktojn de la lingvo. Komence de marto, li uzis artikolojn el la magazino "MONATO" dum kurso pri energio en alia klaso (1AC) kaj koniĝis tiel la kvalitojn de Esperanto, pri kiu li donis klarigojn. Alia prelego okazis en la sama liceo la 3an de aprilo. Deko da gelernantoj interesiĝis, 5 jam aliĝis al la perkorespondanta kurso kaj sama nombro principe aliĝis en la venontaj tagoj.

MONTIGNY-lès-METZ

Un nouveau groupe d'espéranto a été récemment créé à l'instigation de Madame NAU, élue présidente. Son sigle est G.E.M.M.E et son siège social est fixé à l'adresse suivante: "Maison pour Tous Marc Sangnier", 8 allée Marguerite, MONTIGNY-lès-METZ.

Madame Nau a par ailleurs été interviewée le mardi 9 mars 1982, dans l'émission de 7h45 sur les ondes de Radio-Luxembourg par le journaliste Georges Simonin.

MUNSTER

Kvar gelernantoj sekvis E^o-kurson ĉi-jare en la kolegio de Munster, inter ili profesoro pri fiziko. Du kursoj en la semajno ebligis finlernon de "Metodoll" post du monatoj kaj duono. Sekvis prefektigaj kursoj laŭ la sama ritmo kun korespondado ("Kastora Klubo", Irano kaj Nov-Zelando). Post ĉies partopreno en la Federacia Kongreso en Mulhouse pre-paraĝas ekspozicio en la kolegio (800 gelernantoj). Pere de la unua rendevuo de "Metodo 4", ĉiuj interesatoj konatiĝos kun la Internacia Lingvo. Jam anoncis sin profesoro pri la germana lingvo por sekvi la venontjaran kurson. Inter kvar profesoroj, kiuj jam lernis la lingvon, unu nun aktivas.

E. Ludwig

FKEA (Franca Katolika Esperanto-Asocio) kongresis dumpaske.

Oni ne povas diri, ke tiu kongreso -eble nur kongreseto, eĉ kunveneto- estis grava evento, kiu perturbis aŭ mirigis la nanciajn homojn. Tute ne!

Sed, ĉar ĉio havas sian "sed" -ĉu pozitiva, ĉu negativa- tiu aro da katolikaj Esperantistoj faris grandan laboron interne de sia asocio kaj malinterne.

Interne: mi ne multe parolos pri tio, ĉar multaj membroj de nia neŭtrala orient-franca Federacio ne estas katolikoj; mi nur diros, kaj tio estas la ĉefa atingo de nia kunveneto, ke ĉiujare, ekde 1983, la unuan semajnfino de junio okazos en "LE CENACLE" (religia domo en LAXOU) internaciaj spiritaj ekzercoj en la internacia lingvo. Tio volas diri, ke ĉiujare, kom post iom, eniros la katolikan medion la ideo ESPERANTO.

Kial ni atingis tiun celon?... Ĉar ni provis -kaj sukcesis- kunveni kun la fratulinoj de la Domo. Ni okazigis kun ili (iu novismemulo en Esperanto kuraĝus diri: kun "iŝi"!) dulingvan Di-servon: parte en la franca, parte en esperanto. Kaj tio ne ŝajnis strangaĵo al la


fratulinuoj, pro tio ke inter ni estis tri Germaninoj, kiuj ne scipovis la francan. Mi nur diris: "Por respekto al tiuj Germaninoj, ĉu vi konsentas, ke mi klarigu en Esperanto la diraĵojn franclingvajn?" Ili -aŭ "iŝi"- tuj akceptis kaj eĉ proponis, ke ni havu veran parton en Esperanto. Post la Di-servo, ĉiuj partoprenintoj agnoskis laŭte la taŭgecon de E^o, ties fluecon kaj ties muzikon.

Mi do povas aserti: eta kongreso, grava sukceso.

Dankon al la dudek-kvin partoprenintoj, kiuj faris grandan vojaĝon ĝis NANCIO. Unue ili opiniis, ke ili nur kongresetos. Nun ili scias, ke ili sukcesegos. Kaj tiu novaĵo estas sciigenda ĉu ne?

Roger DEGRELLE

partoprenu dum somere !!



Estas tute neeble aperigi en nia federacia bulteno ĉiujn eventojn, kie oni povas praktiki esperanton. Ni mencias nur ĉu "lokajn", ĉu "elstarajn" aranĝojn, pri kiuj ni scias, ke niaj legantoj havas intereson... kaj al kiuj estas ankoraŭ eble aliĝi je la apero de tiu-ĉi INFORMILO.

N.B.- Adreso de informsendanto aŭ aranĝanto kuŝas interkrampe.

Por la INFORMILO N^o39 sendu viajn aperigindaĵojn nepre antaŭ la 20a de septembro 1982.

Kalendaro

la redaktoro: P. DENIS

<u>MAJO</u>	28/01 Kongreso de UFE, ORLEANS (UFE, 4bis, rue de la cerisaie, 75004 PARIS)	
	28/31 Germana-Kongreso, FR-MÜNSTER (Brandenburg, Brinker Damm, 24, D-4404 TELGTE 2)	
<u>JUNIO</u>	15/24 Internacia Konferenco de ILEI, (LKK: Rolando Incoronato Pia, V. Panoramica 63, Seiano di Vico Equenso, Italio I-80056 ERCOLANO, NA)	
	17/20 Tendaro apud Hambacher (Tini kaj Eki WOITE, An der Kirche 33, D-6115 MÜNSTER) Schloß/Neustadt FR	
	19/20 Staĝo de Parolata-Esperanto (programo kaj aliĝilo en ĉi-tiu n ^o de LA INFORMILO) F-MOULINS-lès-METZ	*
	18/20 Kultura Semajnfino, HOMBURG-Saar (SEL, Schulstr. 30, D-6601 SCHEIDT)	
<u>JULIO</u>	02/04 Somernokta Festo en OBERKIRCH-FR (E. WOITE - vidu supre)	
	03/17 Familia libertempo en ST-MAGDALENA Suda Tirolo (E. WOITE ...)	
	09/15 Franc-Germana Junulara Seminario (GEJ, Mathildenstr.73, D-2800 BREMEN) AIX-en-PROVENCE-F	*
	15/32 Biciklado de AIX al Belgio (sama adreso...)	
	10/24 E ^o -renkontiĝo de ICEM, BUDAPEST-H (H. Ménard, 1, rue de la Galissonnière, F-44330	*
	24/31 67a UNIVERSALA KONGRESO, ANTVERPEN-B (UEA-sidejo)	
	31/07 38a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de (38a IJK, Duisburgsestraat 12, TEJO, Leuven - B B-3030 LEUVEN-HEVERLEE)	*
	25/07 de aŭg. Internacia Laborbrigado, (E. WOITE...)	
	AHLERSBACH/SCHLÜCHTERN - FR	
	27/7...28/8 Kulturaj Aranĝoj en la (Esperantista Kultur-Domo, Grésillon, Kultur-Domo de GRESILLON - BAUGÉ F F-41950 BAUGÉ)	
<u>AŪGUSTO</u>	31/7...06/08 55a Kongreso de SAT, (OKK: Loukenk. 5, SF-74100 Iilsami-10) Iilsami, Finnlando	
<u>SEPTEMBRO</u>	04/11 Ferio-Semajno de TANEF, Cavigliano, (Erna DÖRING, Pf.225, CH-4003 BASEL) Svislando	
	12/19 E ^o -Semajno, SETE - F (Esperanto, 5 rue Docteur Roux, F-34000 MONTPELLIER)	
	01/07 12a AMIKECO-KONGRESO "sen paroladoj" (Pierre DELAIRE, BP 2002, F-45010 ORLEANS) Egmond aan Zee, Nord-Holando	
	24/26 Kultura Semajnfino, (SEL, Schulstr.30, D-6601 SCHEIDT) Blieskastel/Niederwürzbach - FR	*



Esperanto en la praktiko

UNUECIGITAJ PERLAÛTPAROLILAJ ANONCOJ EN INTERNACIA PASAĜERA TRAFIKO

Prelego en la 1a konferenco "APLIKO DE ESPERANTO EN LA (esperantigis kaj komunikis SCIENCO KAJ TEKNIKO" en ŽILINA, Ĉeĥoslovakio, aŭg. 1981 S-r^o DEMISSY el MONTMEDY 55)



Por "optika" informado al pasaĝeroj eksterlandaj oni aplikas ne nur fremdlingvajn tekstojn sed ankaŭ bildsimbolojn. Tiuj "piktogramoj" estas internacie unuecigitaj, klarigitaj per tabeloj en horarlibroj kaj ebligas kelkajn precizigojn tre koncizajn al ĉiuj pasaĝeroj, sendepende de ilia lingva scipovo.

En "akustika" informado mankas rimedo kun avantaĝoj simile al tiuj piktogramoj... precipe rilate al gravaj anoncoj pri:

- = baldaŭa enveturado de trajno
- = malfruiĝo de trajno
- = trafikado de trajno al alia kajo

Pli kaj pli necesas serĉi novan vojon al simpla, ĝenerale komprenebla anoncado por eksterlandaj pasaĝeroj. Sur tiu tereno Esperanto havas avantaĝojn politikajn, lingvajn kaj organizajn. Pro tio la fak-grupo "Fervojistaj Esperantistoj" en "Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko" ellaboris jenan konkretan proponon: en stacidomoj kun granda internacia pasaĝera trafiko oni anoncu per laŭtparolilo gravajn trafikinformojn antaŭ alveno de trajnoj direktitaj al fremdlingvaj landoj, ne nur nacilingve sed ankaŭ -ripete- en Esperanto. Oni preferu internacie konatajn vortojn. Jen estas la plej gravaj informfrazoj:

- 1 - "Atentu! Trajno... de... al... alvenos... minutojn post la plantempo".
- 2 - "Atentu! Ĉe kajo... enveturas trajno... de... al... tra...".
- 3 - "Atentu! Trajno... de... al... startos ĉe kajo... Mi ripetas".

La frazojn kaj necesajn nombrovortojn oni publikigu kune kun nacilingvaj tradukoj sur afiŝoj en stacidomo kaj -post plurlanda realigo- ankaŭ en internacia horar-libroj post piktogramklarigo. Pasaĝeroj, kiuj volas uzi la novan informrimedon, kapablas relative facile enverbigi al si la malmultajn frazojn kaj nombro-vortojn sen lerno-devo de la lingvo mem.


Trafik-altlernejo "Friedrich LIST" en Dresdno subtenis klopodojn por esplori la publikan komprenkapablecon. Tie oni eksperimentis kun 98 gestudentoj. Klarigaj folioj estis disdonitaj kun la tradukita teksto kelkajn tagojn antaŭ la eksperimento sed estis malpermesite uzi la klarigojn dum la eksperimento. Tiam okazis imitado de 5 "anoncoj" -unufoje ripetitaj- nome pri 1 enveturo, 2 malfruiĝoj kaj 2 kajo-ŝanĝiĝoj. Krome enestis entute 7 diversaj nombrovortoj. Jen la rezulto:

fakto	kompreno	nombrovorto	kompreno	nombrovorto	kompreno
enveturo de trajno	94%	kvar	69%	deknaŭ	77%
malfruiĝo de trajno	99%	ses	84%	dudek kvin	67%
kajoŝanĝiĝo	96%	sep	92%	tridek	92%
		dekok	73%		

Krom tio la faka grupo eksperimentis pli frue kun ne-esperantistoj sen aldono de iu ajn klarigo, nur pri la esprimo "30-minuta malfruiĝo". Partoprenis entute 183 homoj el 5 landoj. Ke temas pri "malfruiĝo" de trajno, komprenis 72%, nombrovorton "tridek"...50%.

Esencan valoron havas la fakto, ke tiu afero estas simpla, komenca -verŝajne unua- provo uzi la internacian lingvon ne nur por relative malgranda esperantistaro sed ankaŭ por plibonigo de informado al ne-esperantista publiko.

Por krei konkretan eksperimenton en formo de mikromodelo, necesas, ke en pluraj landoj troviĝu entuziasama aktivulo aŭ aktivul-grupo el esperantista fervoja sekcio, kiu senlace agas ĉi-koncerne kun fervojaj instancoj pri laŭtparolilo-uzado. Ĉiuj aktivuloj reciproke korespondupri siaj spertoj, demandoj, sukcesoj kaj fiaskoj.



Interesiĝantoj bonvolu skribi al: E^o-Asocio en Kulturligo de GDR, Fakgrupo Esperantistaj Fervojistoj, Charlottenstraße 60, DDR-1080 BERLIN

14 angulo de l' scivolemulo

Pilgrimu kun ni en nia bela arbaro!!

DAŬROFOLIAJ ARBOJ EN LA VOGEZA MONTARO

La turistoj, migrantoj, eĉ tieuloj ofte nomas *abio*, ne nur la abion sed ankaŭ la *piceon*, *duglasion* kaj la *pinon*, sume ĉiujn daŭrofoliajn arbojn.

Jen kelkaj proprecoj faciligantaj al nefakuloj distingi ilin.



A B I O (*abies alba pectinata*)

La trunka ŝelo estas glata, griza kun veziketoj entenantaj *rezinon*, iame uzatan de la arbo-hakistoj por flegi siajn vundojn; pli malfrue la trunka ŝelo malheliĝas kaj iĝas *sulkeca*.

La *pingloj* (folioj) sidas unuope, samnivele sur la du flankoj de la *frondo* (branĉeto) kiel la dentoj de kompilo = pectinata; ĉe la ekstremaĵo ili estas ronformaj kaj fenditaj kaj sur la subsurfaco oni rimarkas du blankecajn striojn.

La *strobilo* (konuso) sidas sur la plej supraj branĉoj; pro tio la maturaj abioj pli-longigas tiujn branĉojn je la malprofito de la trunka kreskado kaj perdas la piramidan formon; ili *tabliĝas* diras la fakulo. Sub la influo de aŭtunaj brumoj, la strobilo deskvamiĝas, la grajnoj kun eta pergamena flugileto disvastiĝas, kaj sur la lastaj branĉoj restas nur tigetoj, kiujn oni vidas kiam la sekvata pado surnivelas la abiojn. Oni ne trovas abio-strobilojn sur la grundo sub la maturaj arboj.

abio
abies alba
pectinata



strobilo (konuso)




subsurfaco
de folio abia

P I C E O


La trunka ŝelo de la *piceo* estas rufeta kaj fajne skvama. La pingloj estas brilaj kaj iom pikaj; tratranĉita laŭlarĝe la pinglo montriĝas triangulforma. La pingloj sidas unuope ĉirkaŭ la frondo.

La strobiloj, post la fekundiĝo (pere de la vento) pendas diversnivele sur la branĉoj, tial la piceoj restas ĉiam piramidformaj. La strobiloj malfermiĝas sub la influo de varmo ofte jam en la vintro kiam la sunradioj reflektiĝas sur la neĝo, tial ne malofte oni trovas la flugilet-havajn grajnojn sur la neĝo. Fine la malplena strobilo pli-malpli frue falas teren.

piceo
picea excelsa



folio



transversa
tratanĉito

En la voĝejaj arbaroj oni renkontas la arbaran pinon (*pinus sylvestris*), la nigran pinon kaj la blankan pinon.

La "arbara pino" (*pinus sylvestris*) kreskas en la ebena kaj sur la montoj, ĝis la mont-talio.

La ŝelo de la trunko estas sulkeca ĝis la alto de 6/8 metroj, plisupre ĝi iĝas lamena kaj kuprotona.

La folioj (pingloj) sidas duope en fajna foliingo sur la frondo. La strobiloj estas flave-grizaj, malbrilaj kun pedunkleto; la skvamoj ne posedas sproneton sur la skudoj, ili malfermas sin sub la influo de la sunvarmo por ellasi la grajnoj. La malplenaj strobiloj ofte restadas 2/3 jarojn sur la frondoj antaŭ ol fali teren.



pino arbara

pinus sylvestris

ina floro

La "nigra pino" (*laricio austriaca*), La ŝelo de la nigra pino estas sulkeca kaj malhela, preskaŭ nigra ĝis la disbranĉiĝo; ĝiaj pingloj estas pli longaj kaj pli krudaj, kompare al tiuj de la arbara pino. Ankaŭ ili sidas duope en pinglingo sur la frondoj.


La strobiloj estas pli dikaj ol la strobiloj de la arbara pino kaj ili havas sproneton (pikaĵon) sur la skudo (ŝildeto).

La blanka aŭ Weymouth pino (*pinus strobus*)

La trunka ŝelo estas glata, hele-griza kaj, ce la maturaj arboj, nigra kaj fendohava.

La pingloj sidas po kvin -malofte po tri aŭ kvar- kune en la sama pinglilo sur la frondo; ili estas fajnaj, supraj. La strobilo estas bananforma; ĝi malfermiĝas sub la influo de varmo.

blanka pino

pinus strobus

J. K.

pinglingo

"artistoj", muzikantoj, ĝojemuloj... ni vokas vin!

Dum la Federacia Kongreso en Mulhouse, la 4an de aprilo, proponis samideanino novan agadon por "vivi" la lingvon kaj pli ĝoje trapasi la renkontiĝojn.

Kiel?

Unue: malgranda sed agadema grupo preparas skeĉojn, muzikaĵojn, ludojn, poemojn, dansojn ktp...

Due: la grupo partoprenas diversajn renkontiĝojn kaj animadas amikajn vesperojn (kune kun la lokaj samideanoj!)

rimarko: tio ne konkurencus amikajn artistojn... sed kompletigus certagrade.

Ni komencos en la venonta septembro (ni jam estas 5! Ni atendas vin!)

Ni intencas "trejni" dum semajnfinoj (unufoje pomonate ekzemple)

Sendu vian nomon kaj adreson al: Lydia BLOCH, 11, rue des Ducs, F-55000 BAR-le-DUC


kaj sciigu, ĉu vi interesiĝas pli pri muziko, skeĉo, ktp. (ĉu vi ludas muzikinstrumenton)

Ĝis!



distra angelo

KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE: 1 Ĉiuj atendas ĝin. 2 -pronomo (akk.). 3 Lando (rad) - sufikso (rad) - prepozicio. 4 Insulo - prepozicio. 5 Nombro - antaŭ aŭ post la birdo - konjunkcio - favori. 6 Dungi - ĉeftrabego de ŝipo - vento (rad). 7 Likvaĵo - pronomo - granda urbo. 8 Brando (rad) - transmeti. 9 Profeto - asia lando. 10 Signo - dividi. 11 Parto - afrika besto (rad).

VERTIKALE: 1 Unu el la unuaj de l'printempo - freŝa ejo. 2 Malgranda sako - teksebla herbo (rad). 3 Mediteranea insulo - adverbo - por kunigi metalajn pecojn. 4 La dekkvara - krucifero (rad) monero (rad). 5 Triangula aŭ trapezforma ilo - verba sufikso - moviĝi. 6 Adverbo - speciale kanti - sur la kapo aŭ

en la monujo (rad). 7 Aspekto de la vizaĝo - maljuna - konjunkcio. 8 El ĝi eliras la vereco - sur la montaro - por loki statuon (rad). 9 Birdo el la Nordo (rad) - frakcio - konjunkcio. 10 Diserigi tutaĵon (rad) - afrika riverego (rad).

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj silaboj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La la kaj 4a kolonoj vertikalaj legataj formas proverbon.

a al aro eb eco ek elo eno es et fu ia id iva ki kon le li lo ma ma n na ne ni nio ono or oso pre pso ra re so so su te to ve za

1	+ - - + -	influas la humoron
2	+ - - + - - -	certagrade senorda
3	+ - - +	ŝovi la langon sur
4	+ - - + -	perfekte glata surfaco
5	+ - - + - - -	efektive ekzistas
6	+ - - + - - -	normo
7	+ - - + -	posteuloj
8	+ - - + -	rara gaso
9	+ - - + - - -	astra-fenomeno
10	+ - - + -	infanece kredema
11	+ - - +	estinta
12	+ - - + -	sonricevilo
13	+ - - + - - -	soveta respublika
14	+ - - + - -	alten
15	+ - - + - -	alta ebena teramaso
16	+ - - + -	granda senorda kvanto

NIAJ POETOJ...

*Et-Amoro superflugis
la kastelon en la park'
inter arboj alteriĝis
kaj preparis pri la ark'*

*Baldaŭ venis sur la vojo
sin tenante per la man'
junaj fraŭlo kaj fraŭlino
senatentaj pri l'inĉan'*

*Kiam Amor' ilin vidis
tuj pretiĝis la saĝet'
kaj la korojn li nun celis...
ili haltis sur vojet'*

*Kio poste tuj okazis
tion scias nur la di'
ĉu vi iam iun amis?
ne...? Li dirus ĝin al vi!*

*Onidiro
nur dirono
de sciaĵo
eta part'
kiu kreskas
al malvero
ade kreskas
al verac'
disvolviĝas ĝi
kaj kuras
tra la urbo
kia hast'
ĉu vi scias
ĉu vi scias
demandado
sen prokrast'
sed ĉu tion
do mi diris
ne
protesti
mi deziras
vane
oni diris
ĝi rondiris*

E. L.

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ - INFORMILO n°37

krucvortoj: feliĉan jaron - anaso -
laktuko - zomi - kazeo -

ŝam -eriko - buklo - ombro - la - ksifio - laro - asonanci - ore - tial -
ies - aedo - ordinato - esenco - evonim - rubio - boaco -ke - omega -
laki - ol - litero - bien - do - al vi ĉiuj.

silabenigmo: "neniu estas profeto en sia urbeto".

CLUB d'ESPERANTO de METZ
Maison de la Culture
36, rue St-Marcel
57000-METZ

SUPPLEMENT A LA INFORMILO n° 38 - 2° tr. 82

15° STAGE PRATIOUE D'ESPERANTO PARLE

Une fois de plus nous organisons pour tous les Espérantistes et les Amis de l'Espéranto de notre région un stage où TOUS PEUVENT PARLER.

Nous invitons tous les Espérantistes des régions voisines, de France, d'Allemagne, de Belgique et du Luxembourg à notre stage qui aura lieu à l'ERMITAGE de MOULINS-lès-METZ les Samedi et Dimanche 19 et 20 juin 1982.

5 cours sont prévus :

- Cours A 1 : pour ceux qui n'ont aucune notion d'Espéranto.
- Cours A 2 : pour ceux qui ont étudié la moitié d'un cours élémentaire par correspondance ou qui ont participé au stage précédent.
- Cours B : pour ceux qui ont terminé un cours du 1° degré : ils apprennent à parler simplement mais uniquement en Espéranto.
- Cours C : KROKODILADO MALFERMESATA.
- Cours D : PRI ESPERANTO-LITERATURO.

Il y a donc un menu spécial pour chaque catégorie et c'est pour cela que nous osons inviter tout le monde! Hélas le nombre de lits est limité à 60: respectez la date limite d'inscription si vous désirez loger à moindre frais et dans un cadre agréable.

PROGRAMME : SAMEDI 19 JUIN 1982

- 13 à 14h30 : Arrivée et accueil des participants.
- 15h00 : 1° cours (chaque cours dure 45 minutes - repos de 15 minutes)
- 18h45 : Service de librairie. Discussions amicales par petits groupes.
- 19h15 : Repas en commun à l'ERMITAGE.
- 21h00 : Soirée culturelle.

.....
A recopier
ou
A découper
INSCRIPTION AU 15° STAGE D'ESPERANTO PARLE
19.20 - 6 - 82
à
MOULINS-lès-METZ

NOM PRENOM
ADRESSE
JOUR ET HEURE D'ARRIVEE PAR TRAIN OU EN VOITURE

Cours choisi A 1 A 2 B C D Entourer le cours choisi.
Je réserve lit (s) en chambre(s) à 1 ou 2 lit(s), entourer le chiffre choisi, pour la nuit du 19/20 juin.
Repas : Samedi soir Dimanche midi
Je désire passer l'examen : Atesto pri lernado
Atesto pri praktika lernado
Atesto pri kapableco
Etes-vous abonné(e) à la INFORMILO ?
Mettre un OUI où il faut.

DIMANCHE 20 JUIN 1982

- 8h00 : Petit déjeuner
8h30 : Reprise des cours selon le rythme de la veille.
11h30 : Messe en Espéranto.
12h00 : Service de librairie - Libroservo.
Conversations amicales - Amikecaj babiladoj.
Départ pour la Maison de la Culture, 36 rue St-Marcel, METZ.
13h00 : Repas en commun dans le beau cadre de la Maison de la Culture.
Après le repas on peut danser ou visiter la ville.
Komitatanoj havos iom da laboro.

EXAMENS : Les élèves des cours B-C-D peuvent passer un examen. L'examen a lieu le dimanche matin.

FRAIS DE PARTICIPATION

INSCRIPTION : 38 F par personne
20 F pour les abonnés à la INFORMILO, les membres de leur famille et les jeunes de 12 à 18 ans.
Gratuité pour les enfants de moins de 12 ans.

CHAMBRE ET PETIT DEJEUNER : 45 F
30 F pour les jeunes de 12 à 18 ans.
25 F pour les enfants de moins de 12 ans.

REPAS DU SAMEDI SOIR : 30 F sans boisson, 25 F de 12 à 18 ans, 15 F en-dessous de 12 ans.

REPAS DU DIMANCHE MIDI : 40 F tout compris, 30 F de 12 à 18 ans, 20 F " " " " .

SERVICE DE LIBRAIRIE - LIBROSERVO

Tout Espérantiste devrait acheter au moins un livre par an : ĉiu Esperantisto devus aĉeti almenaŭ unu libron po jare !

Si vous désirez des livres sans payer les frais de port, veuillez passer commande avant le stage. Vos livres vous attendront et vous trouveront avec joie dès votre arrivée. Pour le cours D, l'étude du livre VOLE... NOVELE est conseillée avant le stage : envoi du livre dès réception de la commande.

Commander les livres à : LIBROSERVO, B.P. 23, 54510 TOMBLAINE. Vous recevrez votre commande avec la facture.

LIVRES : Je commande les ouvrages suivants :

- | | | | |
|-------------------------------|---------------------------------------|------|-----------------|
| - Pour les cours A 1 et A 2 : | JUNULKURSO pour A 1 | 24 F | indispensable |
| | NOVA RACIA KURSO pour A 2 | 35 F | , indispensable |
| | KASEDO DE RACIA KURSO | 30 F | , conseillée |
| - Pour les B : | POR LA PRAKTIKANTOJ | 22 F | conseillé |
| - Pour les C : | PAŜOJ AL PLENA POSEDO | 28 F | conseillé |
| - Pour les D : | VOLE... NOVELE necesa, kun sendkostoj | 50 F | |

Pour les familles et groupes indiquez à part les nom, prénom, adresse et éventuellement âge des participants. Envoyez votre adhésion accompagnée d'un acompte de 25 F par personne avant le 7 juin à : CLUB D'ESPERANTO DE METZ

Maison de la Culture et des Loisirs
36, rue St-Marcel
57000 METZ

Chèques bancaires à l'ordre de : Club d'Espéranto de Metz

Chèques postaux à l'ordre de : Mme Madeleine de ZILAH 2620 33 W NANCY